Esperanto Societo Frankfurto

Julio-Aŭg. 2023

ESPERANTO-INFORMILO

Foto: G. Hennemann, en junio ´23
Esperanto-informtablo en Frankfurto sur la placo „Hauptwache”.

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

La julia-aŭgusta eldono de la Esperanto-Informilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Ulrich Fellmann

Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende	Klub-vesperoj
Dienstag, d. 4. Juli 23	**mardon, la 4-an de julio 23**
19:00 h MEST per Zoom	**19:00 h MEST per Zumo**
Offene Sprachrunde	**Malferma babila rondo**
Dienstag, d. 11. Juli 23	**mardon, la 11-an de julio 23**
19:00 h MEST per Zoom	**19:00 h MEST per Zumo**
Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)	**Fermita babila rondo (nur klubanoj)**

Zoom-Ligilo: https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 18. Juli 23	**mardon, la 18-an de julio 23**
18:30 h MEST surloke	
18:30 h **Sprachrunde:** N.N „Diskussion über unsere Bibliothek“	**18:30 h** **Babila Rondo**: N.N **„**Diskuto pri nia biblioteko“
19:30 h **Vortrag:** U. Fellmann „Bedrohungen der Menschheit”	**19:30 h** **Prelego:** U.Fellmann “Minacoj al la homaro“

mardon, la 25-an de julio,23
ekde la 19h horo: **Senprograma samideana babila renkontiĝo**
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

El la klubo

Naskiĝtagoj

En julio festos sian naskiĝtagon:

06.07. Bittner, Dr. Robert Arthur
09.07. Eckstädt, Katharina

Ni kore gratulas!

Antaŭanoncoj: 14.8. – 03.9.23 Saalbau Schönhof (MÜZ) Ferioj

- **Sabato, 08.07.23**
  12:00-18:00

  ESF ekskursas al urbo Offenbach. Ni renkontiĝas 12:00 tagmeze en restaŭracio Stern, Wilhelmsplatz 7 , 63065 Offenbach am Main.
  Post tagmanĝo je la 13:30 horo ni kune iros aŭ veturos al la fama Ledomuzeo kie atendas nin eleganta gantekspozicio. La ekskurso finiĝas ĉe Cafe-Bar-Restaurant Försters en Goethestraße 59, kie tabloj estas rezervitaj ekde 16:00 ĝis 18:00.
  Ligiloj: http://www.brasserie-offenbach.de/karten/zumStern/Speisekarte_Stern.pdf
  https://www.ledermuseum.de/besuch
  https://cafe-foersters.de/speisen-und-getraenke/

- **Sabato, 15.07.23**
  15:00-19:00

  ESF infotablo en la urbocentro ĉe Biebergasse apud ĉefgardejo(Hauptwache).
  Ĉiuj bonhumoraj Esperantistoj estas bonvenaj, precipe tiuj kiuj pretas alparoli preterpasantojn distrumpete kaj tamtami nian karan verdan lingvon

- **Sabato, 19.08.23**
  13:00-17:00

  ESF-somerfesto en Langenhain ĉe la nacia bahaa centro de Germanio
  Ni kore invitas al la ESF-somerfesto, kiu ĉi-jare estas organizita de nia klubmembro Bernhard Westerhoff el Hofheim-Langenhain. La evento okazas ĉe la nacia bahaa centro de Germanio resp. en la ombro de la ĝis nun sola bahaa templo de Eŭropo, kie eblas uzi la ekipaĵojn de la tiea akceptejo por vizitantoj kun ekspozicio kaj librejo ktp. Ni esperas je bona vetero kaj sidos ekstere – alikaze sub granda tendo.
  La adreso estas: **Eppsteiner Straße 95 en 65719 Hofheim–Langenhain**.
  La somerfesto komenciĝas precize je la **13-a** posttagmeze kaj finiĝas cirkaŭ la **17-a** vespere. Kiel kutime ĉiu bonvolu kunporti laŭplaĉe iom da manĝaĵo kiel kukon, salaton kaj kolbasojn por la kradrostado. Bernhard provizos trinkaĵojn.

Naturamikoj – longtempaj strategiaj partneroj de Esperanistoj ?

Opinia eseo de G. Hennemann

Ekzistas ja multjara kaj fruktodona kunagado kaj kunlaboro de Esperantistoj kun la Naturamikoj, asocio, kiu en Germanio difinas sin kiel "soci-ekologia kaj soci-politike aktiva asocio por mediprotekto, milda turismo, sporto kaj kulturo. Pli ol 65 000 membroj en 540 lokaj grupoj volonte laboras por la daŭrigebla evoluo de socio. La junulara organizaĵo de Naturamikoj estas la Naturamika Junularo (dt. Naturfreundejugend) en germanio,
Retligilo: https://www.naturfreunde.de/ueber-uns.
Fondita de aŭstraj socialistoj en Vieno en 1895, hodiaŭ la internacia movado „Amikoj de Naturo" havas pli ol 350 000 membrojn. La tegmenta organizaĵo NaturFreunde Internationale (NFI) havas pli ol 40 membro- kaj partnerorganizaĵojn.



Bildo: Naturamikaj domoj ĉirkaŭ Frankfurt/Majno, Fonto: https://www.naturfreunde.de/haeuser/suche

En Frankfurto en la 1980-a jaroj ankoraŭ ekzistis interligo de Esperantistoj kaj Naturamikoj, eĉ faka grupo „Esperanto", kiu organzis lingvokursojn en la Naturamika domo „Auf dem Steinberg" en Langen, Oberer Steinberg 94. Estis proponataj semajnfinaj lingvokursoj je kvar niveloj samtempe:
1. Baza kurso por komencantoj sen antaŭscioj.
2. Progresiga kurso kun la celo kompletigi la vorttrezoron, lerni ĉiujn 16 gramatikajn regulojn kaj ĉirkaŭ 500 elementojn.
3. Profundiga kurso, kun la celo konduki al flua apliko de la internacia lingvo, enpenetro en literaturon kaj historion de Esperanto kaj konatiĝi kun la strukturo de la Esperanto-Movado.
4. Seminaria kurso, kun la celo apliki Esperanton al temoj de ĝenerala edukiĝo kaj al aferoj kiuj transiras la ĉiutagan uzon.
La kursoj funkciis paralele kaj samtempe. Do devus esti surloke almenaŭ kvar Esperanto-instruistoj dum ĉiuj anoncitaj kvar semajnfinoj. Tiu estas ja interesa fakto, kiu nur imageblas se ekzistis bona interrilato inter tiamaj Esperantistoj kaj Naturamikoj. Kial tiu interrilato ne ekzistas plu kaj ĉu indas provi revivigi ĝin?
Laŭ mi estas grava la cirkaŭaĵo kaj najbareco kie oni ofertas lingvokursojn. La domoj de la Naturamikoj certe ofertas tute alian etoson ol la monotonaj seminarĉambroj de okazaĵejoj ofertitaj de Saalbau. Kontraste al tio, Naturamika domoj situas en trankvilaj kaj naturaj, neĝenaj

lokoj, kie ne estas tiom da distraĵoj kiel en urbocentroj. Ofte estas tranoktebloj kaj eĉ eblas festi kune dum la vespero, kio estas ja alia pluspunkto por semajnfinaj lingvokursoj. Alia aspekto notindas: Estas konata ke precipe junuloj suferas multe de la amaso da distraĵoj ofertataj de interreto kaj do multaj de ili jam ne povas koncentriĝi pli ol 10 minutojn je unu afero. Ankaŭ plenkreskuloj pli kaj pli suferas de tiu fenomeno nomita acedio (dt. Teilnahmslosigkeit, Acedia), vorto kiu venas el la greka kaj signifas ‚senzorga' aŭ senzorgeco. Ĝi indikas sintenon kiu estas direktita kontraŭ penado kaj fortostreĉo kaj reagas al ĝi kun malemo aŭ laco. „Acedio multe rilatas al enuo kaj apatio. Vi senpripense rulumas tra Instagramo kaj ne povas trovi finon, kvankam vi mem rimarkas, ke tio ne utilas al vi." (el la magazino Lydia.net, n-ro 2/2023). Sed acedio ja estas tre kompleksa temkampo kaj indus pritrakti ĝin en venonta artikolo. Nun mi nur diru ke la Naturamikoj en Germanio jam rekonas tiun danĝeran fenomemon kaj reagis kun fondo de "Centro por Antaŭzorgo de Radikaliĝo kaj Engaĝiĝo en Naturprotekto", (germanlingve: "Fachstelle Radikalisierungsprävention und Engagement im Naturschutz (FARN)".



Touristenverein
DIE NATURFREUNDE
Landesverband Hessen e. V.
Fachgruppe Esperanto

6 Frankfurt am Main 73
Postfach 730282
Geschäftsstelle: NF-Haus am Polopleiz

Wochenendseminare ESPERANTO 1981

Naturfreundehaus "Auf dem Steinberg", Oberer Steinberg 94
6070 Langen (Telefon 22530)

23.-25. Jan.
03.-05. Apr.
02.-04. Okt.
20.-22. Nov.

Beginn: Jeweils Freitag, 19.30 Uhr mit dem Abendessen
Ende: Am Sonntag gegen 14.00 Uhr
Komenco vendrede je 19.30 h per la vespermanĝo
Fino dimanĉe ĉ-aŭ 14.00 h

An jedem dieser Wochenenden beginnt ein neuer Grundkurs!
Die Kurse laufen parallel nebeneinander. Neueinstieg, Fortsetzung und Unterbrechung sind daher an jedem Seminarwochenende möglich. Anfänger ohne Vorkenntnisse sollten aber einen Grundkurs vollständig mitmachen. Nettolernzeit an einem Wochenende zirka 15 Stunden.

En ĉiu el tiuj semajnfinoj komenciĝas nova baza kurso.
La kursoj funkcias paralele kaj samtempe. Novkomenco, daŭrigo kaj interrompo ĉiam eblas. Komencantoj sen antaŭscio tamen partoprenu bazan kurson plene. Venu vi mem kun viaj interesuloj, kursanoj, grupanoj! Neta lerntempo en unu semajnfino ĉirkaŭ 15 horoj.

Parallele Kurse in 4 Stufen:

1. Grundkurs — für Anfänger ohne Vorkenntnisse.
Ziel: Vermitteln eines grundlegenden Wortschatzes und grundlegender grammatischer Kenntnisse: ca. 300 Elemente.

2. Aufbaukurs — für Teilnehmer mit Vorkenntnissen aus 10 - 15 Lernstunden; das entspricht dem Inhalt eines zweitägigen Grundkurses (wie oben), oder 2 - 3 Monaten Abendkurs.
Ziel: Aufstocken des Wortschatzes; alle 16 grammatischen Regeln; ca. 500 Elemente.

3. Kurs zur Vertiefung — für Teilnehmer mit Grundkenntnissen, die dem Ziel der Stufe 2 entsprechen.
Ziel: Hinführen zum flüssigen Gebrauch der internationalen Sprache; Einblick in Literatur und Geschichte des Esperanto; Strukturen der Esperanto-Bewegung kennenlernen.

4. Seminarkurs — nur für Teilnehmer geeignet, die fließend Esperanto sprechen und verstehen.
Ziel: Anwendung der internationalen Sprache auf Themen der Allgemeinbildung, über den Alltagsgebrauch hinaus.

Vortragsprogramm der Stufe 4 wird auf Wunsch zugesandt

Alle Stufen: Samstag buntes Programm mit Sketch, Spielen, Disko! Jeder kann mitmachen, Vorschläge stets willkommen!
Du hast ein Instrument? Bring es mit!
Sabatvespere Distra Vespero

Disko mit Lothar!
← Jen Lothar (nia disk-ĵokeo...)

Paralelaj kursoj en 4 ŝtupoj:

1. Baza kurso — por komencantoj sen antaŭscioj.
Celo: Peri bazan vorttrezoron kaj bazajn gramatikajn sciojn; ĉ-aŭ 300 elementoj.

2. Progresiga kurso — por partoprenantoj kun antaŭscioj el 10 - 15 lernhoroj; tio egalas la enhavon de dutaga baza kurso (kiel supre), aŭ 2 - 3 monatoj en vespera kurso.
Celo: Kompletigi la vorttrezoron; ĉiuj 16 gramatikaj reguloj; ĉ-aŭ 500 elementoj.

3. Profundiga kurso — por partoprenantoj kun antaŭscioj konformaj al la celo de la ŝtupo 2.
Celo: Konduki al flua apliko de la Internacia Lingvo; Enpenetro en literaturon kaj historion de la lingvo esperanto; konatiĝi kun strukturoj de la esperanto-movado.

4. Seminaria kurso — taŭga nur por partoprenantoj, kiuj flue parolas kaj komprenas esperanton.
Celo: Apliko de la Internacia Lingvo al temoj de ĝenerala edukiĝo kaj al aferoj kiuj transiras la ĉiutagan uzon.

Foto: Informilo pri Seminario de Esperanta Naturamikaro, Langen 1981. El la arkivoj de CDELI.
Sendita de Ruben Fernández Asensio al nia telegrama grupo la 28-an de aprilo. Dankon, Rubeno !

Kion komunan bazon havas Naturamikoj kaj Esperantistoj (respondo de ChatGPT)

ChatGPT (temas pri babilboto, la mallongigo signifas "Babilanta Genera Antaŭ-trejnada Transformilo")

Uzanto

Kion komunan bazon havas Naturamikoj kaj Esperantistoj?

ChatGPT

Naturamikoj kaj Esperantistoj estas du malsamaj grupoj kun diversaj interesoj kaj celoj. Naturamiko estas iu, kiu studas, aprezas kaj defendas la naturon kaj ĝiajn ekosistemojn. Ili kutime fokusas sur ekologia konservado, biodiverseco kaj ekosistema sano. Naturamikoj povas esti sciencistoj, ekologoj, aktivistoj aŭ homoj kun simpla interesado pri naturo.

Esperantistoj, aliflanke, estas homoj, kiuj parolas aŭ aprezas la Esperanto-lingvon. Esperanto estas planlingvo kreita de Ludoviko Zamenhof en la fino de la 19-a jarcento, kiu celas esti lingvo por internacia komunikado kaj kultura interŝanĝo. Esperantistoj ofte havas intereson pri lingvoj, kulturoj kaj interkompreno inter diversaj nacioj kaj popoloj.

Tamen, estas eblecoj por Naturamikoj kaj Esperantistoj kunhavi komunajn bazojn aŭ interesojn. Ekzemple, ambaŭ grupoj valoras interkomprenon, interkulturan dialogon kaj la protekton de la mondo en kiu ni vivas. Ili povas partopreni samajn aŭ similajn projektojn, kiel ekzemple internaciaj konferencoj pri biodiverseco aŭ ekologia konservado, kie ili povas uzi Esperanton por faciligi komunikadon inter partoprenantoj el diversaj landoj.

Krom tio, Esperanto mem havas iom da terminologio rilatanta al naturo kaj ekologio, kiu povas esti utila por Naturamikoj, kiuj volas disvastigi siajn ideojn kaj konceptojn internacie.

En konkludo, kvankam Naturamikoj kaj Esperantistoj estas malsamaj grupoj kun siaj propraj temoj kaj intereso, ili povas trovi komunan terenon en siaj celoj kaj valoroj, kaj eble kunlabori en projektoj kaj eventoj, kiuj konsideras ambaŭ aspektojn.

Religio – “Kun Dio, sen Dio, kia Dio”

Opinia eseo de Reinhard Pflüger

Lastatempe okazis prelegoj kaj aperis artikoloj, kiuj tuŝis la demandon, ĉu Dio ekzistas kaj se jes, kia ri estas. Tiuokaze mi nun prilumas la aferon el alia vidpunkto. Bedaŭrinde mi ne povis mem ĉeesti la prelegojn, sed de Georgo mi ricevis la prezentaĵon kaj kelkajn pliajn informojn, kaj pri bahaismo mi antaŭe plurfoje legis. Mi verkis la suban tekston jam antaŭ legi la junian EI, sed ties artikolo nenion ŝanĝas. Ĝia argumentado estas la plej malforta de la tuta ricevita materialo – laŭ la sama logiko ne ekzistas vivantaj bestoj ĉar homoj povas fari tamagoĉion.

Unue mi konstatas, ke la materialo disponigita de Georgo evidente estas verkita de homoj, kiuj mem ne kredas je Dio, sed ne prezentas argumentojn por ties neekzisto, nur kontraŭargumentas kelkajn indicojn por Dio kaj la dieco de Jesuo, donas klarigojn kial homoj kredas je Dio sendepende ĉu ri ekzistas, kaj konstruas modelon, kiu ne bezonas Dion.

Do: La **demando post la prezentitaj argumentoj estas tute malferma.**
Mi ĉi tie prezentas du indicojn, kiuj por mi estas gravaj, unu por Dio ĝenerale kaj unu por Kristo. Mi koncedas ke ili ne estas pruvoj - ne povas esti, ĉar ĉiu pruvo baziĝas sur antaŭsupozoj, kaj tiu demando estas tiel baza, ke oni povas disputi ĉiujn antaŭsupozojn. Sed en kazo de dubo mi rekomendas la veton de Paskalo, kies esenco estas: "Se Dio ekzistas, estas saĝe sekvi Lin. Se ne, oni almenaŭ ne perdas." Eĉ Sloterdijk koncedas ke religioj ekzercas la metafizikan imunsistemon, kiel li nomas ĝin. La veto estas neperfekta, unue ĉar Paskalo preteratentas la eblon, ke Dio ja ekzistas, sed kristanismo estas malvera. Due serioza kredo ne eblas nur surbaze de tiu veto. Tial mi intence skribis: en kazo de dubo.
Sed efektive ekzistas pli stabila fundamento por kredo je Dio ol tiu veto. Tradicioj kaj personaj spertoj povas utili, sed por dubantoj kiel Griffith kaj Sloterdijk tie ĉiam ekzistas aliaj klarigoj. Do ni venu al raciaj konsideroj. Unue pri Dio la Kreanto.

Ĉu ni estas intence faritaj?
Multon el la mirindaĵoj de la mondo la evoluteorio povas bone klarigi. Kelkaj gravaj transiroj estas tamen malfacile imageblaj, se oni supozas nuran hazardon. Ankoraŭ pli mirinda estas la komenco de vivo. Kiel el nenio estiĝas mekanismo, kiu fidinde kaj interpretas kaj reproduktas informojn, kaj samtempe havas tiajn informojn, ke la interpretitaĵo kapablas havigi al si la materialon por pluekzisto kaj reproduktado? Antaŭkondiĉo por ĉio estas la naturaj leĝoj. Ke ekzistas tiuj stabilaj leĝoj, estas necese por daŭripova vivo. Ke tamen restas iom da nedifiniteco sur subatoma nivelo, estas necese por evoluo. La spaco, en kiu fortoj efikas, devas havi ekzakte tri dimensiojn, kaj tiel estas. Kelkaj fizikistoj eĉ asertas, ke por altnivela vivo la bazaj fizikaj konstantoj devas havi sufiĉe ekzakte la valorojn, kiujn ili vere havas. Ĉio ĉi aspektas kiel intenco, kaj kiel ekzemple la matematikisto John Lennox mi kredas, ke estas tiel. (Por eviti miskomprenojn: Per tio mi ne asertas, ke homoj aŭ ĝenerale la surtera vivo estas la sola motivo por krei la universon.)

Fine mi prilumas la rolon de Jesuo. Ĝis ĉi tie konsentas anoj de multaj religioj, precipe la monoteismaj. La divido estas:

Ĉu Jesuo estas Filo de Dio?
Mi ne traktas la demandon, kion "Filo de Dio" ekzakte signifas, ekzemple kion opinii pri la virga naskiĝo. Sed estas evidente, ke laŭ propra sinprezento li estis pli ol profeto (kiu montras al Dio ekster si), sed Dio ĉeestis en li. Ĉar ĝuste tiun postulon la gvidantaj judoj opiniis blasfema kaj pro ĝi ili krucumigis lin. Se temus pri posta plialtigo fare de liaj anoj, ne estus kaŭzo por krucumo. Do doni al li rolon de unu profeto inter aliaj, kion faras ekz. islamanoj kaj bahaanoj, ne vere eblas, sed **ekzistas nur tri ebloj**:

1. Jesuo arogis tiun rolon kontraŭ pli bona scio, do mensogis. Tio konfliktas kun liaj instruo kaj konduto. Krome estas malfacile imageble, ke li restis ĉe tiu pozicio en danĝero de mortpuno.
2. Jesuo erare pensis tion. Por tiu ideo necesas alta grado de frenezeco. Aliflanke estas vaste agnoskite, ke li diris multajn saĝaĵojn. Ĉu tion povas fari frenezulo?
3. Estas vere. Kaj **se estas vere, tio signifas multe pli** ol formalan rangon de Jesuo aŭ ke la kristana etiko estas sekvinda. Unue signifas ke Dio ekzistas, sed ankaŭ multe pli ol tion; nome ke Dio senkondiĉe amas nin kaj pardonas al ni, kaj akceptante tiujn amon kaj gracon kaj ĉerpante el ili, ni povas ami niajn kunhomojn.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Hartmut):

Amikino al la alia: “Imagu, mi havas nun du infanojn.“
La alia amikino respondas: ”Ho, kiel tio povas esti en via aĝo? Miascie vi nur havas unu filinon.”
La unua amikino sekve respondas: “Feliĉe mia filino pli kaj pli maturiĝas, sed la dua infano estas mia edzo, kiu neniam maturiĝas.“

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉifoje prezentas estas:

626. — AI du sinjoroj samtempe oni servi ne povas.

Estas tre bona kaj utila proverbo kiu ĉiam aktualas pro tio, ke ni ĉiuj ja estas allogata fari pli ol ni povas.
Kaj estas grava principo koncentriĝi je unu afero kaj ne serĉi distraĵon traktante multajn aferojn samtempe.

Enigmo (sendita de Ulriko)

La sekva teksto estas traduko de komenciĝo de konata literaturaĵo. Ĝi entenas de mi kreitan tekstpecon kiu ne enestas la originalo, kaj entenas ŝanĝitan nomon. Oni eltrovu:
1. Kiu estas la aŭtoro de la originala verko?
2. Kiel nomiĝas la originala verko?
3. Kiu estas la falsa nomo, kaj kio estas la ĝusta nomo?

Jen la teksto:

Dezerta loko.
Tondro kaj fulmo.
Eniras tri sorĉistinoj...

Unua: Kiam ni tri renkontiĝos denove...
En tondro, fulmo aŭ en pluvo?

Dua: Kiam la tohuvaboho estos finita, Kiam la batalo estos perdita kaj venkita.

Tria: Tio estos antaŭ sunsubiro.

Unua: Kie la loko?

Dua: Sur l'erikejo.

Tria: Tie por renkontiĝi kun... - ŝi paŭzas momenton, dum siaj fratinoj kuniĝas ĉirkaŭ ŝi, kaj poste ŝi kriegas la nomon de la heroo en ekstazo de diabla ĝojo:
Voldemort!!

Unua: Mi venos, Grizkatuliĉo!

Dua: Bufulo vokas!

Tria: Nun!

Ĉiuj: Justo malicas, kaj malico justas!

[Ŝvebas for tra nebulo kaj malpura aero.]

Lasta paĝo

Skribiloj, de Ulrich Fellmann

Jam antaŭ kvin mil jaroj la egiptoj uzis plumbokrajonojn. Tiujn poste ankaŭ uzis grekoj, romianoj, kaj eŭropanoj. Ankaŭ inkon ili jam uzis, kaj birdan plumon por inkskribi uzis la araboj ankoraŭ pli ol tri mil jarojn poste.

Ĝenis ilin la devo dum skribado oftege dronigi la plumon en inkujon, sed pluraj provoj konstrui ĉepluman inkujon ne sukcesis.

La unua moderntempa plibonigo rilate skribiloj okazis en la 16-a jarcento en Britujo - estis la anstataŭigo de plumbo per grafito en krajonoj.

En 1740, franca inĝeniero ĉe la kortego de Ludoviko la 14-a, Nicola Bion, inventis fontoplumon kiun nutris inko de rezervujo, fluante al la plumpinto, por ke oni dum skribado ne plu tiom oftege devu dronigi skribplumon en inkujon. Li nomis ĝin la "senfina skribplumo". Ĝi tamen ne sufiĉe bone funkciis. Pro tio, la plej vaste uzata skribilo restis la krajono surbaze de kerno el grafito.

En 1883 Lewis Edson Waterman en Novjorko sukcesis solvi la problemon de kontinua inkprovizo el la inkujo, kaj en 1884 ricevis la patenton por la inkskribilo.

La 10-an de junio 1943 la hungaro László Bíró en Argentino patentigis la globkrajonon, kiu dum la sekvaj kvindek jaroj iĝis la plej ofte uzata skribilspeco.

1966 mi sesjaraĝe eniris la bazan lernejon, kie mi lernis skribi per devige uzinda inkskribilo. Tiam haveblis nur du specoj, la blua estis de la firmao Pelikan, la verda de Geha. Ambaŭ uzis jam ink-kartoĉojn. 1968 mi hazarde en la loĝejo de miaj patrinflankaj geavoj trovis la nigran inkskribilon de mia plej juna onklo. Ĝi ankoraŭ ne havis kartoĉojn, sed ensuĉis la inkon el inkboteleto, kiam oni plurfoje turnis parton de la skribilo. Ĝi fascinis min, kvankam ĝi likis. Dum la lastaj de miaj lernojaroj, fine la 1970-aj jaroj, la uzo de inkskribiloj ne plu devigis, kaj pli kaj pli da lernantoj ekuzis globkrajonojn. Mi provuzis ilin, sed ili ne skribis same mole kaj glate. Ili havis pli grandan reziston, kaj la farbo sur la papero ne estis same kohera kiel mia inko. Ĉar mi skribis tre rapide kaj malgrande, tio ĝenis, kaj mi daŭris skribi inkskribile.

Dum la militserva kaj la universitata tempoj mi plu uzis inkskribilon. Kompreneble, ne plu estis la sama kiel en la lernejo, sed ankoraŭ kartoĉa de firmao Pelikano. Intertempe troviĝis ilin en ruĝa koloro, kaj certe iam mi eluzintis pli ol la dekan. Miaj manskribitaj noticoj de la universitataj prelegoj estis tiom bone legeblaj kaj kompletaj, ke multaj studentoj kopiis ilin por lerni por la ekzamenoj. Intertempe multaj por skribi uzis novan skribilspecon - feltokrajono. Ĝia farbo komence estis tre densa, sed ankaŭ la felto havis sur la papero pli grandan froton ol la inkskribilo, kaj kiam oni dum iom da tempo ne uzis la feltkrajonon, ĝi sekiĝis kaj ne plu bonaspekte skribis. Post mia universitata diplomiĝo, mia amatino donacis al mi inkskribilon - nigran eksmodecan sufiĉskribilon de firmao Pelikano. La firmao havis la ideon noveldoni la malnovajn modelojn, kaj sciante ke mi amas inkskribilon, ŝi kaptis la ideon tion donaci al mi. Ekde tiam mi uzis tiun inkskriban modelon.

Ĉu private aŭ profesie, en la laborejo de mia firmao, en universitata instituto en Polujo, en la inĝeniera oficejo ĉe Volvo en Svedujo, poste dum mia dua universitata tempo, kiam mi skribis per tia inkskribilo eĉ la japanajn kaj ĉinajn literojn, por kio ĝi tre taŭgis. Multajn jarojn, laborlokojn kaj urbojn poste, mi edziĝis kaj la familio kreskis. Miaj infanoj ekvizitis la lernejon, kaj tie lernis skribi per nova krajonspeco - gelatoskribilo. Unuavide ĝi aspektis kiel globkrajono, ĝi fakte estis globkrajono, sed anstataŭ la tradician krajoninkon ĝi uzis gelaton. Rezulte de tio, ĝi

skribis glate kaj bele. Mi ekuzis tiajn nun tempe paralele al mia inkskribilo.

Mian pluan uzon de inkskribilo tiam miaj infanoj iomete ekprimokis, kaj mia filo iam diris (ne nur pro tio) "paĉjo, vi estas el la mezepoko". Mi respondis latine.

La gelatkrajonoj funkcias bone. Sed kiam ili malpleniĝintas, oni ne povas ilin reŝargi. Oni ĉiam devas ilin forĵeti kaj aĉeti novan. Por persono kiu ekokupiĝis pri la temoj medio kaj klimatoŝanĝiĝo jam meze de la 1980-aj jaroj, tio ŝajnis evitinda malavantaĝo. Tradicia globkrajono havis sian tempon. Kvankam ne por mi, ĉar inkskribilo ĝin kvalite en du kriterioj superas. Moderna gelatokrajono nun kvalite egalas. Sed hodiaŭ, reuzeblo, evito de materialkonsumo dum produktado kaj energioŝparo gravas por pli multaj homoj ol antaŭ kvardek jaroj, kiam tielpensantaj homoj estis nomataj stranguloj aŭ eĉ frenezuloj. Mi tamen ne atendas, ke tio kaŭzos renesancon de la inkskribilo. Por bone uzi ĝin oni komence bezonas ekzercan tempon, kaj tion hodiaŭaj junuloj provas eviti. Mi tamen esperas, ke inkskribiloj ne tute malaperos, aŭ almenaŭ, ke la de mi laste aĉetota funkcios sufiĉe longe.

--